nia voĉo

madrida esperanto-liceo februaro 2011

## ĜENERALA KUNSIDO DE MEL

La lundon 24-an de januaro 2011 okazis la Ĝenerala Kunsido de Madrida Esperanto-Liceo, kun la partopreno de 14 membroj (11 ĉeestaj kaj 3 reprezentitaj)

La protokolo estis sendita al ĉiuj anoj de la Liceo. Jen kelkaj el la konkludoj kaj proponoj plej elstarigindaj:

- Oni aprobis la raporton de aktivaĵoj kaj la kontojn de la antaŭa jaro.
- Oni komisiis al la estraro la pretigon de programo kaj buĝeto por la jaro 2011.
- Madrida Esperanto-Liceo kunlaboros en la organizado de la 70-a Hispana Kongreso de Esperanto kiu okazos en San Lorenzo de El Escorial fine de junio kaj komence de julio 2011. La Liceo zorgos almenaŭ pri la aktivadoj okazigotaj en la urbo de Madrido.

Aliaj decidoj kaj komentoj:

- Oni daŭrigos la eksponadon de la kolekto de paneloj "Esperanto: desafío a Babel". La venonta antaŭvidata ekspono okazos en la Centro Cultural Eduardo Chillida, en la distrikto Moratalaz, ankoraŭ sen konfirmita dato. La eksponadon nepre akompanos diskonigaj prelegoj kaj aliaj aktivadoj.
- Liceo kunlaboros en la organizado kaj diskonigado de ĉeestaj kursoj en Madrido.
- Oni faros specialan kampanjon por la vendo de la libro "El hombre que desafió a Babel", el kiuj ankoraŭ restas multaj nedistribuitaj ekzempleroj.
- La redaktadon de la bulteno "Nia Voĉo" ekde sekva numero transprenos Toño del Barrio.
- Oni petos opiniojn al la anoj pri la uzado de logoo aŭ emblemo por la Liceo, uzebla en retejo kaj aliaj lokoj.

Estis konstatite kun ĝojo la (re)aliĝo de novaj anoj al la Liceo, kio, eĉ se modeste, estas pozitiva signo pri rompo de la lastatempa tendenco al malkresko de la membraro.

## 70-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Kiel anoncite en la pasinta numero, la 70-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en San Lorenzo de El Escorial (Madrido) inter la 28-a de junio kaj la 2-a de julio de 2011.

La aktivaĵoj de la Kongreso disvolviĝos en Kulturdomo de San Lorenzo, situanta en Unua Domo de Metioj, historia konstruaĵo projektita de Juan de Herrera samstile kiel la fama Monaĥejo. La programo enhavos turistajn, kulturajn kaj distrajn aktivaĵojn, pri kiuj ni informos en sekvaj numeroj.

La 3-an de julio, dimanĉo, okazos postkongreso organizota de la Liceo, en la urbo de Madrido. Ankaŭ pri ties detaloj ni baldaŭ informos.

Tre grava estas la plano doni al ĉiuj partoprenontoj la eblon ricevi atestilon pri Esperanto laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro, organizata de Universala Esperanto-Asocio kaj Ŝtata Lingvoekzamena Centro de Budapeŝto. Por ricevi plian informon konsultu sekvan paĝon: http://edukado.net/ekzamenoj/ker, kaj informu la Federacion kaze ke vin interesas la eblo partopreni en la ekzamenado.

Aliflanke, la 7-a junulara **Iberia Renkontiĝo** okazos de la 13-a ĝis la 15-a de majo 2011 en Sant Andreu Salou, proksime al la urbo Ĝirono. Pliaj informoj en http://esperanto.cat/ir2011/.

## RETPAĜO DE MEL

Madrida Esperanto-Liceo havas nun propran retpaĝaron, gastigatan en la ĝenerala retejo de Hispana Esperanto-Federacio. La baza adreso estas http://www.esperanto.es/mel/ .

Kelkaj el la trajtoj kaj enhavoj estas ankoraŭ provizoraj, kaj do ĉiu ano kaj vizitanto povas fari sugestojn al nia retadreso.

## EN LA MADRIDA GAZETARO

La 31-an de januaro, en la madrida suplemento de la ĵurnalo "El Mundo" aperis intervjuo farita en la sidejo de HEF al Toño del Barrio. La intervjuo okupis preskaŭ la tutan lastan paĝon de la kajero, en la rubriko "Con mucha cara".

Skanaĵo de la intervjuo estas trovebla en la kolekto de ĵurnaleltondaĵoj de la retpaĝaro de HEF, en: http://www.esperanto.es/eltondajxoj/Dokumentoj/2011/20110131_elmundo.pdf.

## POR SPEKTI

La kantoj prezentitaj dum la kvaropa ĥor-prezento en la Zamenhofa tago de Madrido, la 12-an de decembro 2010 spekteblas en: http://www.ipernity.com/doc/mpancorbo/album/217579

Kelkajn fotojn de tiu aranĝo: http://www.ipernity.com/doc/28185/album/217557

Interesaj filmoj en aŭ pri Esperanto troveblas en http://www.youtube.com/user/ekstremoj.

## KOTIZO POR 2011 KAJ ALIĜO

Estas tempo por ke la membroj pagu sian rekotizon al la Liceo, ĉu rekte al la kasisto (Pepe Platas) dum la ĉiusemajnaj kunsidoj, ĉu per transpago al la banka konto 0081-7110-98-000 126 6730, ĉe Banco Sabadell/Atlántico, kun klara indiko de via nomo. Laŭ decido de la Ĝenerala Kunsido, la kotizo plu restas senŝanĝa: 12 eŭroj jare.

Ni invitas ĉiujn madridajn esperantistojn aliĝi al la Liceo. Tiu estas la maniero fortigi la esperantan agadon en nia urbo kaj regiono, kaj partopreni en la organizadon de aktivadoj favoraj al la internacia lingvo. Sendu mesaĝon al nia adreso aŭ al la madrida oficejo de HEF, aŭ pere de la reto al saluton@wanadoo.es.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Dum venontaj monatoj, niaj konversaciaj rondoj plu okazos ĉiulunde ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3º-7, tel. 914 468 079.

Ni planas alian ekstersidejan kunvenon dum iu semajnfino fine de februaro aŭ komence de marto. Estu atenta al postaj informoj, kaj al la retaj diskonigoj en la retforumo esperanto_madride http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com